# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 16 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 16

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12.


## Belgio

### Ŝtata buĝeto por "La Ministroj de Dio" kaj aliaj profitoj de tiuj parazitoj

Belgio estas tre malgranda lando — proksimume 30 mil kvadrataj kilometroj — k enhavas malpli ol ok milionojn da loĝantoj. Kompare kun la planedo k ĝia loĝantaro, ŝajnas, ke la nombroj ĉi supre cititaj estas sensignifaj. Tiel ne opinias la internaciaj procentegistoj k la enlimaj amatoroj de la plusvaloro. Plie tiuj lastaj ekspluatadas kvindek milionojn da negroj en Kongo — belga kolonio okdekoble pli granda ol la "patra lando".

Estu konvinkitaj, ke tiuj patriotoj konsideras la malgrandan Belgion kiel grandan orminejon, kreitan por ili de la "kara bona dio". Estas mirige vidi ilin direkti produktadon k komercadon, k "riski" monon, "tiel penege ŝparitan", en ties entreprenoj por la "gloro de la plej bela k bona patrio inter ĉiuj".

Ne ridetu, ĉar mi diris, ke kapitalistoj *riskas* monon. Ekzistas ja reala danĝero: la ribelonta proletaro — sen kiu la orminejo nenion valorus! Por submeti la laboristaron, ja ne mankas leĝistoj, juristoj, juĝistoj, oficiroj, ĝendarmoj, policistoj ktp. Sed tiuj perfortaj gardistoj "blankmanaj" ne ankoraŭ sufiĉe efikas, ankaŭ necesas dormigistoj de la ribelema penso proleta. Kaj ĉu oni povas trovi, eĉ inventi, pli efikan kloroformon intelektan ol la predikadon de la religianoj? Kredeble tiuj uloj, kies manoj estas dece blankaj, k ventroj diable dikaj, sin foroferas. Tion farante ili garantias paradizon al si mem ... en tiu ĉi mondo, la alia estas por la ceteraj ..., kiuj aĉetos enirkartojn.

* * *

En 1929, la katolikaj pastroj nombris pli ol ses mil, plie kelkdekoj da protestantoj k hebreoj. Ni aldonu, ke laŭ oficialaj statistikoj de 1920 la gemonaĥoj nombris 54 511. Sed depost 1920 ili ankoraŭ multe plinombriĝis. Iliaj predikoj estas ankaŭ fortigataj de multnombraj civilaj geinstruistoj katolikaj, ĉu de la religiaj, ĉu de la ŝtataj (nomataj: "neŭtralaj") lernejoj. Sed pri la monaĥejoj k instruado, niaj amikoj L. Bergiers k M. Van Aelst raportos. Ĉi tie, mi nur devas raporti pri la kosto de la pastraro.

Laŭ la ŝtata buĝeto de 1929, la pastraro ricevis rekte, kiel salajron, sesdek-sep milionojn da frankoj (1 germana marko = 8,50 frankoj), plie bonajn loĝejojn senpage.

Jen la kosto de la ĉefepiskopo, en Malin (Malines):

| | frankój |
|---|---|
| Ĉefepiskopejo — kvazaŭa palaco, ho senhejma Jesuo! | ??? ??? |
| Ĉefepiskopo | 100 000 |
| Tri sekretarioj | 45 000 |
| Kvar ĝeneralaj vikarioj | 120 000 |
| Dekdu kanonikoj | 216 000 |
| Sume po jaro | 481 000 |

Ni povus daŭrigi pri la ses episkopoj. Ne bezonas, ĉu ne?

Ni nur memoru, ke la plej simpla pastro estas pli bone pagata ol instruisto "neŭtrala" k samgrada.

La subtenado al la preĝejoj estas pagata de la ŝtato, provincoj k komunumoj. La partopreno de la ŝtato dum 1929 kalkuliĝas je du milionoj da frankoj. Pri la provincoj k komunumoj mankas al mi dokumentoj.

La diversaj laboroj k objektoj internaj de la preĝejoj estas ĉiujare pagendaj de la komunumoj. La komunuma konsilantaro rajtas diskuti la jarajn elspezojn sub la direkcio de sinjoro pastro, sed ĝi ne rajtas kontroli, forĵeti, eĉ malpliigi la fakturon, ĝi devas absolute decidi la pagon! Komedio? Jes, sed ĝi estas leĝe devigata.

Nun eble vi supozas, ke la benoj, mesoj, kantadoj, funebraj servoj, mirakloj, piaj kalumnioj ktp., estante tiel bone pagataj de la ŝtato, provincoj k komunumoj — do per mono ricevita el ĝeneralaj impostoj, eĉ de ateistoj! — devas almenaŭ esti senpagaj por la naivaj kreduloj?

Se vi kredas tion, vi ankaŭ estas naivaj.

Pastroj niaj estas la plej spertaj komercistoj en la mondo.

Ili vendas altpreze objektojn sennombrajn, kiuj kostis al ili absolute nenion. Ili vendas mesojn, preĝojn k benojn; indulgojn de la papo k pardonojn de la kompata dio. Okaze de naskoj, edziĝoj, entombigoj ktp., ili postulas monon. La bonaj kristanoj devas pagi por ne fali en inferon, por eliri el pekpuriĝejo k por eniri paradizon — sen garantioj, sed estas la sola rimedo, ĉu ne?

Ni estu sinceraj! Ili ankaŭ vendas aĵojn, kiuj kostis al ili ion, k kies prezoj estas nur altigitaj ... laŭ tarifoj de la benoj: rozarioj benitaj en Lurd (franclingve: *Lourdes*, fama miraklejo, aŭ — pli bone dirite: skandalejo), medaloj de la Sankta Infaneco, statuetoj de Sankta Kristoforo, kiuj ŝirmas aŭtomobilistojn kontraŭ akcidentoj ktp. — "Ho, vi jam aĉetis ĉiujn artiklojn niajn, gesinjoroj? Estas kvazaŭa miraklo, ĉar ili estas tiel multnombraj! Neniu vendejo similas la nian. Sed jen alia fako: Donu al ni (laŭ grando de via monsako), k ni montros al vi kapon de multkapa sanktulo, pecon de la "vera kruco", unu el la sep prepucioj de Jesuo, aŭ ... fekajon de Sankta Mario!"

---

Ĉu estas mirige, ke por tiuj ĉarlatanoj, la membroj de la Materialista Ligo de Belgio estas delegitoj de la inferanoj?

Tamen ili insultas ankoraŭ pli sovaĝe la sovetajn liberpensulojn. Estas tute logike, ĉar tiuj K-doj ne plu pagas la vendistojn de benita akvo. Nur nia proleta revolucio forbalaos tiun malpuraĵon, kiun multobligas la kapitalista medio.

*Emile Chapelier (Ŝapelje), 9106.*

---

### Gigantaj sukcesoj de l' Ateista Unio en Ukrainio

La Unio de Sendiuloj Ukrainia kun ĉiu tago pli fariĝas amasa organizo. Tion tre elokvente elmontras jenaj nombroj:

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| La | 1. majo 1928 | la Unio havis | | 50 000 | membrojn |
| „ | 1. jan. 1929 | „ | „ | 115 000 | „ |
| „ | 1. majo 1929 | „ | „ | 215 000 | „ |
| „ | 1. jan. 1930 | „ | „ | 523 000 | „ |
| „ | 1. marto 1930 | „ | „ | 723 000 | „ |

Tiel dum du jaroj la nombro de anoj al la organizo dekkvaroblîĝis.

Dum la nura jaro 1929 ĝi pligrandiĝis je 335%.

Krom tio la statistiko por la 1. marto 1930 konstatas, ke en la rondetoj de junaj sendiuloj, kiuj funkcias plejparte en lernejoj, pioniraj taĉmentoj k sim. — estas 201 000 membroj.

Tiel la tuta nombro de organizitaj plenaĝaj k junaj sendiuloj superas 900 000.

*A. Pankov* (laŭ esperantlingva radiodisaŭdigo de "Radio-Ĥarkovo").

---

*Kunlaborantoj!* Kvankam en mia kajerujo amasiĝas multe da materialo, mi ne povis eldoni lasttempe nian Gazetservon pro forresto de mono. Pri tiu punkto ni devos paroli dum nia fakkunsido en Londono. Krom tio mi petas niajn kunlaborantojn verki koncize k surskribi la manuskriptojn nur sur unu flanko de la papero. Mi disponas pri valoraj artikoloj el Sovetio, inter ili ankaŭ tre longaj, sed ĉar nia Paĝo aperas dum kvin semajnoj nur unu fojon, ne estas eble publikigi ĉiujn. K-doj, kiuj interesiĝas pri tiaj artikoloj k volas aperigi ilin en gazetoj, turnu sin al mi. Ne forgesu enmeti viajn leterojn respondkuponojn, tiam la Sekcio plenumos viajn demandojn, dezirojn ktp. akurate. En *Sennacieca Pedagogia Revuo* aperas la rubriko "Edukisto kontraŭ pastroj", kiun ankaŭ gvidas nia Sekcio. Abonu tiun gazeton k kunlaboru. Sendu ĉion, kio rilatas al edukistoj k pastroj, al nia redaktanto.